August Heinrich Hoffmann,

# Abendlied

Abend wird es wieder,
über Wald und Feld
säuselt Frieden nieder,
und es ruht die Welt.

Nur der Bach ergießet
sich am Felsen dort,
und er braust und fließet
immer, immer fort.

Und kein Abend bringet
Frieden ihm und Ruh',
keine Glocke klinget
ihm ein Rastlied zu.

So in deinem Streben
bist, mein Herz, auch du.
Gott nur kann dir geben
wahre Abendruh!

...

August Heinrich Hoffmann,

# Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Surkampare iĝas
ree nun vesper',
milde subeniĝas
paco de l' eter'.

Nur de l' roko bruas
rivereta flu',
kaj la akvo fluas
ĉiam ĉiam plu.

Ne haltigas iu
ĝin je l' tagofin',
kaj vesper' neniu
ripozigas ĝin.

Mia kor', senlace
strebas ankaŭ vi,
vi ripozos pace,
nur se volos Di'.

...

August Heinrich Hoffmann,

# Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Ree vesperiĝas
ĉie en la rond',
paco subeniĝas
kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas
ĉe la roko jen,
kaj ĝi daŭre bruas
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu
endormigas ĝin,
sonoril' neniu
je la tago-fin'.

Mia koro, tia
estas ankaŭ vi!
Pacon trovos mia
koro nur en Di'.

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19).*

*Arg-645-1300 (2012-11-27 18:18:40)*

*Siehe auch:* http://de.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. *Vidu ankaŭ:* http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben *kaj* http://www.musicanet.org/robokopp/fallers.html. *Siehe auch:*http://www.swr.de/swr2/program/sendungen/wiegenlieder/rueckschau/-/id=556006/nid=5556006/did=6102144/pv=mplayer/vv=popup/1vijptk/index.html.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1988-04-16.*

*MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)*

*Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. *La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en* http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html. *Pri la komponisto rigardu:* http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* August Heinrich Hoffmann *(Hoffmann von Fallersleben, ∗1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2013-01-27.*

*Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)*

*La melodio estas aŭdebla en* http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html.